Österreichische Nationalbibliothek
Zeitschriftenlesesaal

AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la austria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno I., Neutorgasse 9, Aŭstrio. — Telefono U 23-1-80

5-a jaro SEPTEMBRO/OKTOBRO 1950 n-ro 9-10

P O R L A P A C O

La plej multaj homoj kaj popoloj volas la pacon kaj abomenas ĉian militon. Ekzistas nur malmultaj personoj, kiuj povus profiti per nova milito, kaj ankaŭ por ili la risko estas probable pli granda ol la ebla gajno, car neniu scias nuntempe, kiom restus ankoraŭ de tiu ci tero post malfermo de atomba milito. Pro tio ankaŭ la statistoj kaj diplomatoj ne povas deziri militon. Ke tamen oni neimageble teruran ekzazantajon jam treege baldaŭ, pri tio kulpas cefe la timo de la kontraŭulo, kiun oni ne fidas kaj kies plifortigon oni maldeziras. Sed ĉar la psikologiaj motivoj de la armado estas sufice egalaj je ambaŭ flankoj kaj ĉiu volas esence nur defendi sin kaj ne mem ataki, la granda militpsikozo nun reganta en la tuta civilizita mondo, estas monstra frenezajo, kiun oni povas malestigi nur per tute nova sinteno de homo al homo, de popolo al popolo.

Kial la popoloj timas kaj malfidas unu la alian ? Grandparte tial, ĉar ili ne sufice konas sin kaj ne sufice komprenas sin reciproke; car la teknike-industria evoluo de la lasta jarcento proksimigis la popolojn nur civilize sed ne kulture. Unu el la cefaj kaŭzoj de tiu ĉi nekomprenado estas ankoraŭ la diverseco de la lingvoj, en kiuj la naciaj moroj kaj pensmanieroj radikas. Al la homoj kun malsamaj gepatraj lingvoj, kiuj ne povas lingvo kompreni sin, mankas la plej grava ligilo de spirita ko-

muneco, la fundamenta komprenilo, kiu kondicas la kultur= komunumon de paca kunvivado. Post kiam la gentoj vivas en lingve kaj state unuigitaj nacioj, tiuj ci farigas moralaj kaj juraj komunumoj, interne de kiuj militaj kver= reloj ne okazas.

Simile la teknike proksimigintaj popoloj de la tero devas kunfandigi al lingve kaj state unuigita komuna mo= rala kaj jura, en kiu ĝenerala, nelimigita interkompreno garantios la obeadon de komunaj legoj

Por la kultura komuneco de ciuj homoj necesas antaŭ cio komuna lingvo kaj komuna kredo. Tiu komuna kredo po vas esti nur la kredo je la homeco. Malsamaj lingvoj kaj kutimoj, ekonomiaj, politikaj kaj religiaj mondrigardoj disigas, car ili ciuj supozas pravaj nur sin mem kaj ci= ujn aliajn kondamnindaj. Sole la kredo je la homeco pov= as unuigi ĉiujn homojn.

Sed car la homoj esence ne estas sangeblaj kaj la predikado de konsideremo dum jarmiloj ne rezultigis ri= markeblajn sukcesojn, do sajnas esti pli laŭ la karakte= ro de la homoj, certigi pacan kunvivadon de la popoloj per superstata, supernacia ordo. Vere ni sdias, ke la opinioj pri la politike-ekonomiaj fundamentoj de tiu or= digo estas tre malsamaj. Se la opinioj konkordus, ne estus malfacile konservi pacon. Diversaj interesoj kaj opinioj ĉiam ekzistos. Ĉiu ne nur r a j t a s , sed d e v a s defendi ilin, s e d n e p e r f o r t e ! Car perfor= to reestigas perforton, malamon kaj militon. Do la nece= san, daŭran ordon kaj pacon de la mondo ni devas atingi per la vojo de la demokrata interkonsento. La ĝenerala paco estas aspirebla kaj efektivigebla nur per pacaj ri= medoj. Malgustega estas la malnova, bedaŭrinde ankoraŭ glorata devizo "Si vis pacem, para bellum!" -(Se vi vol= as pacon, preparu la militon!) Car ne tio atingigas, ki= on oni entuziasme proklamas kiel celon kaj emfaze skrib= as sur la standardojn, sed tio, kio rezultas el la prak= tika sintenado de la partoprenantoj, el la elektitaj ri= medoj kaj montritaj ekzemploj. Se la statistoj kaj parti= estroj ne forlasos la dangeran devizon de la potencemo, se ili ne cesos produkti kaj apliki malhumanajn perfort= ilojn, kaj se la popoloj en siaj politikaj esprimoj pa= rolaj kaj agaj ne farigos pli pac e m a j, ciuj pacrezo= lucioj de la mondo restos senefikaj! La paco ne konsist= as en la celideo, sed en la pacema konduto!

Por la paca unuigo aŭ unua interkomprenigo de la homaro estas bezonataj du internaciaj formiloj:momdlingvo (aŭ mondhelplingvo) kaj mond-registaro (komence eble mondfederacio). La mondlingvo egale interkomprenigante kreas komunan kultursenton, per kiu poste ankaŭ iaj aliaj kontraŭoj estos venkeblaj;kaj la mondfederacio devus laŭ la principo de la homeco sur demokrata fundamento krei mondordon, en kiu la regosferoj de la unuopaj naciaj registaroj estus tiel ligitaj, ke ili povus agi jam nur por la interna bono de siaj popoloj, sed ne plu por la milita pereigo de siaj najbaroj.

La vojo al tiu ci evoluo estas ekirita per la "Unuigintaj Nacioj". La principoj de la homeco estas fiksitaj en la "Deklaracio de Homrajtoj". Necesas enradikigi tiujn principojn en la cerboj kaj koroj de la homoj kaj ekvivigi en ciuj popoloj kaj individuoj.

Kiel u n u rimedon por tiu celo ni proponas Esperanton. Gi estas la sola neŭtrala lingvo, kiu estas praktike provita sur ciuj kampoj de la parola kaj skriba interkomprenigo. Sed la cefa argumento por ni Esperantistoj por tio, ke ni kredas kaj pledas por Esperanto kiel por pacigilo unuaranga estas la fakto, ke la aplikado de la mondlingvo ligas ciujn, kiuj gin parolas, kaj plifortigas kaj realigas la kredon: ke ciuj homoj estas fratoj, inter kiuj povas esti diversaj opinioj, sed neniam okazu militoj kaj perfortoj. La Esperantistoj de ciuj landoj komprenas sin reciproke senpene kaj perfekte; ili jam efektivigis inter si la pacidealon sur la bazo de mondkulturo. Kaj en nia lando la superpartia Aŭstria Esperantista Federacio, en kiu reprezentantoj de ciuj mondrigardoj harmonie kunlaboras por la celo de Esperanto, reale pruvas, ke la kredo je la homeco ne nur estas himero.

Tial ni rekomendas al ciuj pacamantoj decidigi por la generala akcepto kaj aplikado de Esperanto kaj, ne kontentigante per tia decido, mem lerni la mondlingvon por povi intersangi pensojn kun la pacamantoj en ciuj landoj, por tiel konstrui efektivan komunumon de la paco, kiu ne estas bazita sur la potencemo de unuopuloj aŭ politikaj grupoj, sed sur la sincera volo de ciuj homoj, kiuj konas, satas kaj respektas unuj la aliajn.

Ernst Werner.

N I A M O V A D O E N A U S T R I O

STIRIO: Nia stiria movado funebras la elmondiĝon de s-ano lerneja konsilisto Franz SCHÖPTER, kiu mortis post 84 vivojaroj. La kara mortinto estis meritplena pioniro de E. en Voitsberg. Li estis membro de la ekzamenkomisiono kaj la unua kaj ĝis nun sola honora membro de la stiria landestraro. Li gvidis multajn kursojn, skribis vasbartikolojn kaj faris, jam 60-jara, la ekzamenon pri instrukapableco. Li estis modela instruisto kaj neniam sercis sian profiton materian. Tial la urbo Voitsberg ankaŭ eknomis lin honora burgo. E-landestro d-ro HALBEDL al la entombiga ceremonio delegis reprezentanton kun florkrono. - "UNUECO", Graz, sciigas, ke dum la unuaj postmilitaj E-ekzamenoj en Stirio, okazintaj en Aprilo en Graz, 4 ges-anoj estis ekzamenataj pri instrukapableco k 4 s-anoj pri la scio de E. Ĉiuj ekzamenitoj estas membroj de la societo kaj senescepte bone sukcesis, 3 el ili ec kun distingo. La novaj E-instruistoj estas: s-anino Blanka SCHUTZENAU-TRENK, s-ro Josef EDER, s-ro Anton MINAUF kaj s-ro Anton PODREPSCHEK. La ekzamenon pri la scio de E. faris s-ro d-ro Oskar MEISTER, s-ro Josef MANNINGER, s-ro Ferdinand WEICHENBERGER kaj s-ro Josef WESIAN. La venontaj ekzamenoj okazos aŭtune. Kvin junaj membroj entreprenis dutagan biciklan rondveturon por viziti la ges-anojn en 10 stiriaj lokoj. La bonega sukceso de tiu veturo instigas al pluaj veturoj. La programo de la societo inter aliaj variaj programeroj anoncas ankaŭ grandan raporton pri la veturado de la bicikla karavano tra Italio kun lumbildoj, kiun arangis s-ano PODREPSCHEK. La aktiva societo havas 141 membrojn, el kiuj 88 estas abonantoj de la AER. La ceteraj estas subtenantoj. Ĝis mezo de majo oni kolektis 70 kolektivajn membrojn por UEA. Pri la aranĝoj de la societo informas ciklostilita cirkulero. (Ni kore gratulas al la societo pro la sukcesa agado kaj precipe aklamas al la novaj state ekzamenitaj ges-anoj!- La redakcio.)

SALZBURG: Pri la modela laboro de la Salzburgaj ges-anoj elokvente atestas letero, sendita de la ĉefestraro de IFEF al s-ano Anton HUBER. Ni sekve represas ĝin:

"Kara kolego kaj amiko!

Estas agrabla tasko por mi post la hejmreveno el Salzburgo direkti al vi kaj al la ceteraj OKK - anoj kelkajn vortojn por esprimi nian sinceran dankon pro la bonkora akcepto en via urbo kaj pro giganta laboro farita por sukcesigi nian 2an IFEF-kongreson. Speciale mi dankas vin, kolegon Steidl kaj kolegon Zagler, kiuj sendube oferis multegon por agrabligi al ni la restadon. La tuta kongreso donis al ni neforgeseblan impreson pri la sindonemo, oferemo kaj laboremo de niaj Salzburgaj gekolegoj. Mi estas certa ne paroli nur en la nomo de la cefestraro sed nome de ciuj kongresanoj, kiuj kunportis senescepte imponan impreson hejmen pri la kongreso en Salzburgo.

Estos por vi ciuj agrable scii, ke ni unuanime laŭdas vian laboron kaj hejmeniris kun varma simpatio en la koroj por niaj aŭstriaj geamikoj pro la montrita gastameco.

Mi afable petas al vi sincere danki ciujn kunlaborintojn nome de ciuj kongrespartoprenintoj. Ni esperu, ke nia dua kongreso estu nova stimulo por ciuj IFEF-anoj energie daŭrigi la propagandon por nia idealo por ke ni en la tria IFEF- kongreso povu mencii la aligon de la mila membro. Via laboro grave kontribuis al la plifortigo de la interfratiga ideo inter la fervojistoj kaj estu konvinkataj ke nia dua kongreso en Salzburgo restos gravurita en nia memoro kiel unu el la plej sukcesplenaj kongresoj. Tre koran dankon pro cio por ni farita! Vivu Esperanto! Vivu nia I.F.E.F.!

Nome de la cefestraro de IFEF, la sekr.:

J. Iok.

Tirolo: Sen komento ni citas salutkarton de s-ro Landestro Hans STEINER al la E-Centro:

"3.8.50

Korajn salutojn el Tannheim (Gasthof Schwarzer Adler) sendas Hans Steiner.

Mi gvidas ci tie en la lernejo 2 E-kursojn (ciutage dum 14 tagoj). Unu estas por enlogantoj

(20 personoj: inter ili ankaŭ studentoj kaj somer= gastoj), la dua estas por 10 italoj, libertempant= aj ci tie. La instruado estas vere amuza. La mal= bona vetero eĉ favoras la E- kursojn (La kurson partoprenas ankaŭ la lernejestro kun tri plenkres= kaj gefiloj).

H. St."

Laŭ "INFORMLETERO" 4/50 okazis la 27-an de aŭgusto en Lauterbach la TIROLA ESPERANTO-TAGO. La programo enha= vis la jarkunvenon de la tirolaj kaj vorarlbergaj Esper = antistoj kun raportoj kaj novelekto de la landestraro kaj starigo de plano pri la plua agado ktp. Inter alio ankaŭ estas anoncitaj koncerto kaj varbaj paroladoj de s-anoj FOTINGER, E-landestro de Salzburg, kaj HAUSER de la JUN= ULARA RUĜA KRUCO. (Ni raportos pri la aranĝo post ricevo de la raporto. La red.) - La laborkunsonumo "Jugendwandern und Jugendreisen" ĉe la Landa Junularreferejo en Innsbruk (gvidanto E-landestrarano s-ro Fritz PUTZKER) eldonis 52-pegan gvidlibreton tra Thannheimertal ("Führer durch das Thannheimertal"). Ĝi aperis en germana, franca, angla, it= ala kaj ESPERANTA lingvoj. La kunmetadon transprenis sano landestrarano Georg KETTL. Mendu ĝin ĉe Verlag J. Egger, Imst, Tirolo. La prezo estas aŭstriaj ŝilingoj 6.--.

"Ĝis revido en Innsbruck!", jen la vortoj, per kiuj estis finita la Aŭstria E-Kongreso en Vieno. La venontjara AKEM do laŭ invito de s-ano E-landestro STEINER okazos en la bela urbo ĉe la Verda Inn-rivero! La Innsbruck-a grupo ĝoje promesis la kunlaboron por la kongreso kaj volas fa= ri ĉion, por ke ĝi igu impona. Ĉefaranganto estos s-ano R. HAUSER, kiu por tiaj arangoj havas specialan talenton kaj multan sperton.

VIENO: La "Somera parkrendevuo de la Vienaj geesperant = istoj" en la 18a distrikto, Türkenschanzpark, kiun iniciatis la E-kluboj KALOCSAY-LABORO por la feria sezono kunigis dum la belaj jaŭdovesperoj viglan samideanaron - "ĉe la turo". Oni babilis agrable kaj je l' malheligo mal granda verdstela lampioneto eklumis montrante jam de mal= proksime la kunvenejon. Oni kantis al la gitaro de s-ano Hugo KRAUS kaj atentigis la perterpasantajn parkvizitant= ojn tiamaniere pri Esperanto. Ankaŭ propaganda materialo

estis distribuata. Inter la eminentaj ges-anoj de la Vi= ena movado fine de aŭgusto univ.prof. d-ro SIRK faris longan paroladon pri sia partopreno al la ĉijara U.E.A. kongreso en Parizo kaj s-ano MUDRAK interesis la ĉeest= antojn (25 personojn) pri la grandioza vojaĝo kaj la im= presoplena restado en Italio kaj rakontis detale siajn spertojn dum la internacia katolika E-kongreso en Romo.

La kluboj atentigas, ke ekde la 21-a de sept-o ili denove kunvenas ĉiujaŭde inter la 19a-21a en Volkshoch= schule Währing, Schopenhauerstr. 49 (lernejo). El la aŭ= tuna programo oni sciigas speciale pri kolorbild-projek= ciaj paroladoj, okazontaj la 28.9.(La alpa Aŭstrio), 19. 10.(3 fabeloj de Grimm) kaj 2. 11. (kongresoj en Parizo, Bournemouth kaj Romo), al kiuj la Vienaj ges-anoj estas kore invitataj.

La Viena gazeto de la Brita Informservo"WELTPRESSE" aperigis longan artikolon pri E. okaze de la Pariza UEA-kongreso, senditan de sia Pariza raportisto,kiu havis la ŝancon, intervjui s-anon prof. SIRK. La titolo de la ra= portaĵo estis: "Esperanto meritas seriozan konsideron" - (esperantlingve!).

Lai invito de la WIENER MESSE-A.G. ni informas nian legantaron, ke la VIENA AŬTUNA FOIRO okazos inter la 10a ĝis la 17a de septembro. Partoprenos per oficiala ekspo= zicio la statoj: Rumanio, Nederlando, Italio,Jugoslavio, Polio kaj Rumanio.Aparta modo-revuo estos montrata en la festsalono de la Viena Urbdomo ĉiutage je la 16 h 30. Partoprenos radioorkestro sub Charly Gaudriot; program= parolisto: Ernst Track.

MALSUPRA AUSTRIO: NEKROLOGO. La 27-an de aprilo nunjare subite mortis je apopleksio nia nefor= gesebla s-ano Georg WICHTL. Per la kara mortinto la Es= perantistaro sur Steinfeld denove suferas gravan perdon S-ano Wichtl estis unu el niaj plej malnovaj,spertaj kaj sinceraj s-anoj.Deantaŭ tridek jaroj li varbadis por nia afero, instigis la movadon kaj instruis Esperanton. Por ĉiuj inter ni li estis modelo. La landestro de Malsupra Aŭstrio, s-ano SCHWARZ kaj tri anoj el la grupo FONTO , Felixdorf,transdonis dum la enterigo florkronon kun ver=

daj rubansoj kiel lastan saluton al li. Ni kore kondolen= cas al lia estimata familio. Ripozu pace, karegulo!

Johann Schwarz.

En la E-Informilo por Malsupra Aŭstrio n-ro VIII E-landestro SCHWARZ vokas ĉiujn E-istojn de la liglando al nova, plifortigota agado por E. kaj la penso pri la interpopola kompreno. Li instigas la okazigon de kursoj kaj, se tio ne estas ebla, la aranĝadon de "studrondoj", kiujn partoprenu grupetoj da lernemuloj, nombrantaj mal= pli ol 10 personoj. Li ankaŭ petas, ke oni komuniku al li la partoprenontojn al la ĉijaraj stataj E-ekzamenoj en Vieno kaj Graz, kiuj okazos en decembro.

Detalan raporton pri la ESPERANTO-TAGO DE MALSUPRA AUSTRIO, kiu okazis 9an kaj 10an de septembro en Sankt Pölten, ni presos en la venanta n-ro de A.E.R. La tieaj grupoj "NOVA TEMPO" kaj VOITH-UZINO sub la komitatestroj s-anoj FEILBACHER, WITHALM kaj BALAGUE sindone preparis multpromesan programon. - Leŭ la ambaŭgrupa informilo ni ekscias, ke al la nova estraro de "VOITH-UZINO" aparte= nas la ges-anoj Balague kaj Scheuch kiel estroj kaj por la ceteraj funkcioj Röder, ing. Lichtenschopf, Höfer, Manhartsberger kaj Stiedl. La redakcio kun danko kvitan= cas ricevon de bela foto, montranta la partoprenon de la St.Pölten-aj ges-anoj al la Unua de Majo-manifestacio de la laboristaro. Ili varbis por nia lingvo per 3-metra transparento, kiu portis la surskribon "Esperanto, die Brücke von Volk zu Volk".

E-grupo WIENER NEUSTADT agis imitinde por subteni nian E-Radio-Servon. Ĝi petis de oficiala instanco arti= kolon pri la rekonstruo de Wr.Neustadt, esperantigis ĝin kaj sendis ĝin al la centro. La radioparolado okazis la 7.8.50. La aliaj grupoj agu laŭ la ideo de la kolegoj kaj bonvolu ĉiam ankaŭ kunsendi la tekston germanan! - Dum grupvespero en Wr.Neustadt, en kiu ĉeestis 16 urbanoj kaj 4 amikoj el Felixdorf, nia pastra mosto HEBENSTREIT ra= kontis pri sia esperantista vivo kaj malfermis poste la diskuton pri la temo: "Kion diras la neesperantistoj pri nia movado?" La s-anaro entuziasme dankas al s-ano P. H.

SUPRA AUSTRIO: Cirkulero 2/1950 montras viglan vojaĝpre= paradon de la grupo ESTONTO en Linz. Ĝi same havas viglan trafikon de eksterlandaj ges-anoj.

speciale de ges-anoj el Danio kaj Anglio. La aŭstria s-anaro certe volonte legos pri la sukcesaj vojagoj de aŭstriaj karavanoj al eksterlando, kiujn la grupo en Linz sub la gvidado de s-ano NIGL aranĝis!

E L L A F A K G R U P O J

SOCIALISTA ESPERANTISTARO

Dum la nunjara AEK la socialistaj E-istoj okazigis kunvenon, kiun vizitis delegitoj el Vieno kaj la ligl...doj. La ceftemoj estis la disvastigado de E. inter la laboristaro kaj la servigo de la lingvo por la celoj de la socialista partio kaj la sindikata movado. La delegito el Malsupra Aŭstrio raportis, ke la landa Laborista Ĉambro subtenis la landan E-movadon per grava subvencio. Lad raportoj de aliaj delegitoj la socialista gazetaro lastatempe akceptas pli multe da komunikoj pri E. Danko speciala estis esprimata al la redakcio de la semajna gazeto "Die Frau", kiu dum multaj monatoj publikigis ampleksan E-kurson. Kiel prezidanton de la Soc. Esperantistaro oni reelektis eksministron k-don d-ron Hans FRENZEL kaj kiel afergvidantan estron Alfred BERDAN.

Socialistaj Esperantistoj, anoncu vin!

Por montri al diversaj instancoj en la partia kaj sindikata movado, ke E. vere estas praktikata inter la laboristaro ni devas scii la nunan nombron de la socialistaj E-istoj el tuta Aŭstrio. Tial ni urge bezonas viajn nomon, adreson (liglando), naskiĝjaron kaj profesion. Ne hezitu, skribu tuj postkarton al SOCIALISTA ESPERANTISTARO, Vieno I., Neutorgasse 9.

NATURAMIKOJ

Dum la AEK 1950 okazis sub prezido de s-ano Max FINKENZELLER la fakkunsido de la Naturamikaj E-istoj. Ceestis 33 delegitoj el ĉiuj liglandoj. La progamo ampleksis la punktojn 1) raportoj, 2) novelektoj kaj 3) internaciaj aferoj. La elektoj rezultigis jenan fakreferantaron: internacia fakref. ce la ligestraro: M. Finkenzeller; Tirolo - Stöckl, Innsbruck; Stirio - Eder, Graz;

Supra Aŭstrio - Nigl, Linz; Malsupra Aŭstrio - Lampl, Hohenberg; Karintio - Ramschacher, Villach; Salzburg - Holleis, Böckstein. Sekretario por internaciaj aferoj : H. Braun, Vieno. - La naturamika grupo de Vieno resumis sian agadon: 41 ekskursoj = 589 partoprenintoj; 39 grupvesperoj kaj arangoj = 630 partopr.; sportarangoj:10 kun 98 partopr.. Grupvespero: marde, 19-21 h,XV.,Diefenbachgasse 36/12 (Naturamika Centro).

En la fakkunsido de la Socialista E-istaro raportis delegito de la E-istaj Naturamikoj, ke la Centra Estraro de tiu organizo akceptis E. en sian klerigan programon. La internacia federacio de la Naturamikoj eldonas kotizmarkojn kun nuresperanta surpreso.

FERVOJISTA FAKGRUPO

La ampleksa E-rubriko de la sindikata gazeto "Der Eisenbahner" anoncis la gravan jarkunvenon de la F.F.kun ties detala programo. Ĝi okazis de la 1a-3a de IX. en Landeck. Detala raporto je la redaktfino ankoraŭ ne estis je dispono.

POŜTISTA FAKGRUPO

Dum la AEK en Vieno la fakgrupo raportis. En aŭtuno estis arangataj kursoj por komencantoj kaj progresintoj, kiujn gvidis inspektoro SEMPER. Kelkaj novesperantistoj aligis al la fakgrupo. Dum la Decembra Zamenhof-festo, kiun ceestis la protektanto de la E-movado, s-ano generaldirektoro d-ro DWORSCHAK, oni efike varbis inter la kolegaro. La 15.1.50 la fakgrupo arangis sian unuan ekspozicion por E. Specialan meriton havis s-ano MAIER, kies bona varbparolado trovis noteblan eĥon inter la ceestantoj. Honoris la grupon per sia partopreno ministra konsilanto d-ro ENGELMANN, kiu reprezentis la ĝeneral-postdirekcion, la afergv. de AEF, s-ano CECH kaj s-ano VOKAL de VED. La posta direkcio subtenis nin propagande per cirkulero. Same la direkcio montris sian grandan intereson por nia afero, sendejorigante kvar gekolegojn por la postoficejo en la kongresejo. Ĉiloke estu dankate al la estimataj s-roj general-dir. Dworschak kaj oficejestro

Huber kaj al la dejorintaj geoficistoj. Grupestro JANETZKA partoprenis la IFEF-kongreson en Salzburg kiel reprezentanto de la PTT-grupo kaj transdonis la salutojn en la nomo de sia estraro. Rapide progresas la verkado de la dejora frazaro por postistoj en kelkaj lingvoj kun Esperanto. La fakgrupo esprimis la dankon al la nelacigema estimata estro, kolego JANETZKA, al kies iniciatemo la granda parto de la sukcesoj estas atribuenda.

KATOLIKA ESPERANTA VIVO

La XXII-a Internacia Kongreso de Katolikaj E-istoj. La eminenta okazajo de la internacia katolika E-istaro havis lokon de la 10a-17a de VIII. en Romo. Partoprenis pm. 300 ges-anoj el 16 landoj, inter ili 25 el Aŭstrio. Post la Di-servo kun prediko de prof. BECKERS pri la universaleco de la katolika eklezio en Kapitolo okazis la Solena Malfermo. Prezidis kaj salutis por la urbo Romo, vicurbestro G. Andreoli; prof. P. M. CAROLFI OFM, inicIatinto, ceflaborinto kaj prezidinto de la kongreso, prelegis indegojigan salutleteron de Lia Papa Mosto. Fortimpresis signifaj salutvortoj de kard. cefep. d-ro Innitzer (prelegis s-ano MUDRAK) kaj pr. cefep. d-ro Rohracher (transdonis vikaro KAPS); nome de pr.ep. d-ro Pawlikowski salutis d-ro HALBEDL. La Solena Malfermo same kiel la Literatura Vespero estis prezentataj de Radio Romo. Kiel kongrestemojn oni pritraktis: Katolika laborista junularo kaj E., E. kaj skoltismo; la katolikaj scienculoj kaj E.. Okazis ĉiutage Di-servo, parte kun jubilea vizito de la kvar grandaj bazilikoj; krucvojo en Koloseo. Kulminacia punkto estis la Papa aŭdienco en la baziliko S. Petro. La katolikaj E-istoj estis oficiale menciataj de la Sankta Patro, al kiu prof-o Beckers, la nova IKUE-prezidanto, transdonis kolekton de eminentaj katolikaj E-literaturaĵoj. 3foje la organo de la Vatikano L'Osservatore Romano, raportis pri la kongreso. La venonta IKUE-kongreso okazos en Munheno, urbo de la 36a UEA-kongreso. - - La katol. radiostacio HILVERSUM, Ned., sendas ĉiusabate inter 23.15 - 23.20 MET katol. novaĵojn en E. (Ondo 402). - Elementa kurso: I., Graben 13, 19.15-20.30 ĉiumarde; perfektiga rondo: Hl. Geist-paroĥo, XVI., ĉiu-

merkrede je la 20a. - Laŭ decido en Romo estas ano de IKUE depost nun ĉiu katol. E-isto, kiu estas abonanto de "Espero Katolika"; abono jare s. 24.--. (postspk.- konto 105.713 - W. Mudrak). - Ni kore gratulas: al nia pastra konsilanto, komandóra mosto P.G. PLANK, Vieno, okaze de lia 40jara pastra jubileo; al s-ano prof. d-ro F. CHRISTANELL en Salzburg, je la 70jarigo! Walter Mudrak. Al tiuj bonodeziroj ankaŭ la anoj de AEF, de Viena E-Delegitaro kaj la redakcio kore aligas! (R. Cech por AEF kaj VED, Hugo Kraus por AER).

LA 35a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

de univ. prof. dro Hugo SIRK, oficiala delegito de la aŭstria registaro, de la Viena Teknika Universitato k de AEF

La 35-a kongreso de la Universala Esperanto-Asocio okazis en Parizo de la 5a ĝis la 12a de aŭgusto. Ĝi estis vizitata de 2300 partoprenintoj el 35 landoj. El Aŭstrio nur partoprenis kvar ges-anoj. Ok ŝtatoj estis oficiale reprezentataj. La reprezentantoj de 22 landaj asocioj salutis la kongreson. UNESCO, la organizo de la Unuigintaj Nacioj por eduko, scienco kaj kulturo estis reprezentata per sia vicdirektoro, prof. THOMAS, car ĝia generala direktoro Torres Bodet forestis.

La ĝeneralaj kunsidoj okazis en la granda amfiteatro de Sorborne, la Pariza Universitato, kiu grandanime disponigis siajn grandiozajn salonegojn al la kongreso. En unu el la kunsidoj ni estis sciigataj, ke UNO la 2.8. 50 oficiale akceptis la petskribon de la 16 milionoj pri la enkonduko de Esperanto.

La kongreso laboris en kvar sekcioj: 1) E. en lernejoj; 2) sciencoj kaj tekniko; 3) internaciaj intelektaj intersangoj kaj 4) internacia trafiko kaj komerco. En la SOMERA UNIVERSITATO estis faratoj ok prelegoj pri problemoj de medicino, juro, atomistiko, estetiko, sociologio, statistiko kaj scio pri la koloroj.

En la fina kunsido estis unuvoĉe akceptata jena rezolucio:

"La internacia lingvo - estante ne nur teknika rimedo de pensado kaj komunikado, sed ankaŭ potenca

instrumento de proksimiĝo de la homoj en la mondaj kadroj - estas esence ligita al tutmonda paco kaj al la amikecaj rilatoj inter la popoloj. Tial la 35a Universala Kongreso de Esperanto forte subtenas ĉiujn sincerajn klopodojn sekurigi la pacon kaj atendas, ke ĉiuj pacamantoj dediĉos al la internacia lingvo, kiel grava antaŭiganto de internacia solidareco, la merititan atenton."

Kiel loko de la proksima Universala Kongreso en Aŭgusto 1951 estis elektata Munheno. Aligoj jam estas akceptataj.

INSTRUISTA SEKCIO de A.E.F.

Por pli intensivigi la propagandon inter la instruistaro estis la 12an de septembro starigita "Instruista Sekcio". La provizora estraro estas la s-anoj dir. Franz Menacher, Leopold Gschanes kaj Anton Konecny; adreso ĉe la Esperanto Centro, Wien I., Neutorgasse 9, Tel.U23180.

La Instruista Sekcio sendis nome de AEF alskribojn al la Viena urbestro, al la Pedagogia Instituto de Vieno kaj al la viena urba konsilantaro petante la arangon de Esperantokurso por instruistoj en la pedagogia instituto. Okaze de persona intervjuo ĉe la prezidanto d-ro Zechner estis la kursarango konsentita.

La aŭstria instruministerio eldonis novan dekreton (Zl. 71.815-IV/20a/49 de 21a de aŭgusto 1950) pri la nedeviga instruado de Esperanto en ĉeflernejoj kaj sub Zl. 24.476-IV/16/50 de 26a de majo 1950 tian pri nedeviga instruado en mezlernejoj. Simila dekreto pri neobliga instruado en instruistaj seminarioj baldaŭ estos eldonata.

La "I.S." atentigas ankaŭ la gekolegojn pri la "Staĝtaj Esperanto-Ekzamenoj" en Vieno kaj pri la landaj E-ekzamenoj en Graz, Innsbruck kaj Salzburg, kie funkcias landaj E-ekzamenkomisionoj, kaj petas la gekolegojn je anonco.

Ĉiu samideana kolleg(in)o estas petata sin anonci ĉe la "I.S." kaj je sciigo de jam faritaj spertoj.

*** KONTRIBUU AL LA PROPAGANDO-FONDUSO DE A.E.F. ***

V O J A Ĝ R A P O R T O

Ĵus ni ricevis la raporton pri eksterlanda vojaĝo aranĝita de la Turisma E-grupo en Linz, el kiu ni resumas:

Dimanĉe frumatene la bele ornamita aŭtobuso plenstopite forlasis la Linz-an esperantujon (en la domo parolas 8 personoj esperanton). Post vizito de kelkaj vidindaĵoj de Nürnberg ni daŭrigis al Bamberg, kie ni trovis la esperanto-grupejon kaj povis saluti kelkajn gesamideanojn. Post ioma ripozo ni daŭrigis ĝis Hamburg. Dank al nia favora s-ano Weide, polica sekretario, en lernejo polica ni povis uzi la tiajn banejojn kaj en la kantino povis mangi kaj trinki je favora prezo. Poste ni estis gvidataj de tre simpatiaj ges-anoj al nia tranoktejo en Hohenbuchen. Ĉiuj bonege dormis kaj matene elripozataj k bonhumoraj kolektiĝis ce nia aŭtobuso por atingi Schleswig, Flensburg kaj fine la limon german-danan. Tie nin jam bonvensalutis nia s-ano S.K. Nielsen, kiu gvidis nin tra la belega dana regiono de Fredericia, kie ni ĉiuj estis private gastigataj. La tagoj sekvintaj estis fabele belaj. La popolo dana tre afabla kaj simpatia. Post dutaga restado en Fredericia ni daŭrigis tra la insulo Fuenon al Seeland. Unu kaj duonan horon akompanitaj de multaj mevoj ni transnagis la Grandan Belton. Albordiĝinte en Korsör aliaj s-anoj akceptis nin kaj akompanis nin preter Bregendved al Spyellerup, Fakse-Ladeplatz, kie ni estis invitataj por 5 tagoj. Ekskurso sekvis ekskurson. K elkfoje ni konstatis, ke familio gastigis 3,4, eĉ 5 personojn, ili disponigis siajn litojn al ni kaj mem dormis sur simple setitaj matracoj sur planko. Tio estu ekzemplo por tiuj, kiuj tiom ofte senpripense sin nomas idealistoj kaj se oni deziras de ili nur la plej etan, ili pruvas la idealismon per iu ajn preteksto. La gedanoj ege satas nian muzikon kaj kantojn, pro tio niaj prezentaĵoj, "Aŭstria Vespero" ciam estis bonege vizitataj. En Fredericia pli ol 2000 personoj partoprenis nian prezentaĵon. Certe multaj homoj, kiuj gis nun ne sufiĉe taksis la valoron kaj tuŝgecon de la lingvo Esperanto, konvinkiĝis, ke ĝi fakte estas interfratigilo bonega kaj pro tio estas la plej bona ilo por eksterlandvojaĝoj.

Ni kore dankas al la E-grupo en Fredericia, al niaj

karaj geamikoj Nielsen, dankon al la E-grupo Spyellerup-Fakse-Ladeplatz, geamikoj Olsgaad, E-grupo Kopenhagen, geamikoj Kuhlemann, E-grupo Middelfart, amiko Christensen kaj al ĉiuj niaj gastigantoj! Sed ne forgesi ni volas la gesamideanojn germanajn, specialan dankon al s-ano Weide en Hamburg, s-ano Jahns en Braunschweig kaj al la E-grupo en Bamberg!

Jam nun ni preparas vojaĝon por la venonta jaro al Danlando, Nederlando kaj eventuale al Ĉehoslovakio.

Bonvolu konsideri kaj konsili la aferon kaj sendi baldaŭan anoncon menciante ĉu al Danlando, Nederlando aŭ Ĉehoslovakio. Ambaŭ karavanoj plej verŝajne partoprenos la UEA-Kongreson 1951 en München du tagojn. Karl Nigl.

Ekskurso de la grupo Saalfelden

Ni esperanto-gelernantoj de Saalfelden havis grandiozajn tagojn je la 20a kaj 21a de majo 1950. Ni estis invititaj de Salzburgaj fervojistoj esperantistoj partopreni la fineksursón de la Internacia Fervojista Kongreso en Salzburg. Ni ne estis devigataj pagi la vojaĝkotizon de Salzburg al St.Wolfgang. Kaj tie ni havis senpagan manĝon per la helpo de nia Angla esperanto-onklo James Course, kiu estas la korespondanto de nia instruistino s-ino Oberlechner. Jam delonge ni ŝparis, ĉar la aŭtobuson al Salzburg ni devis pagi el nia poŝo. Sed ĉiuj fine havis la monon kaj ni ekveturis. La suno brilis, ni kantis, nia granda verda stelo kaj ĝiaj multkoloraj rubandoj salutis de la aŭtobuso la belan pejzaĝon kaj la preterpasantojn. De ĉiu malfermita fenestro flirtis flago kiun ni faris antaŭe. Ni tiam vidis la belan Salzburgon. La alian tagon multaj esperantistoj el multaj landoj estis en la stacidomo kaj ili ĝoje salutis nin, kiam ili vidis nian stelon. La vetero ankaŭ estis belega kaj niaj koroj plene da ĝojo. Multaj gesamideanoj klopodis paroli kun ni, ili promesis al ni postkartojn kaj ili vere sendis ilin. En St. Wolfgang ni kantis, dancis kaj ludis. La plej grandan sukceson havis niaj esperanto-kantoj. Ĉiuj kantis kun ni. Samideano de nia instruistino, s-ro Moll el Holando estis ĉiam kun ni kaj ankaŭ nia tre ŝatata iama diraktoro lerneja konsilanto Wallinger, estro de la

Saalfeldena E-grupo "Verda Lumo". Ni nun scias,ke esperanto vere estas granda afero kaj granda ilo por la unuiĝo de la homoj. Vivu, kreasku kaj floru Esperanto!

RADIO ROMO

Nun ankaŭ Radio Romo sendas en Esperanto ĉiun dimanĉon kaj ĉiun vendredon de 17.00 - 17.20 MET per la du mallongondaj statioj je m. 19,5 kaj 31,1 varian programon. Aŭskultintoj bonvolu skribi al Radio Roma,Via Veneto n-o 56, Roma, Italia.

*** PROPAGANDO-FONDUSO INSTALITA ***

Laŭ decido de AEK 1950 la estraro de AEF nun instalis Propagando-fondusON kaj petas ĉiujn geamideanojn kaj geamikojn de Esperanto por libervolaj kaj laŭipovaj donacoj subteni nian movadon. La donacata mono estos kvitancata ĉu individue ĉu kolektive en AER kaj sub la kontrolo de la estraro uzota ekskluzive por intensivigo dela propagando de Esperanto. Ni atentigas, ke por enpago en la fondusON povas esti uzata ankaŭ la kreditaj havoj ce AEF.

*** UNUA LISTO: ***

Ges-anoj Bruckmaier 5 S, Cech 5 S, Grimme 10 S,
ge-Loibel 10 S, Zajicek 5 S. Entute 35 S.

ĈIUJN LIBROJN NUR PER "TRAMONDO", VIA LIBREJO!
Wien I., Neutorgasse 9 (Tel.: U 23180)

* * *

Eigentümer und Herausgeber: Österr. Esperantistenverband. Verlag: "Tramondo". - Verantwortlicher Redakteur: Hugo Kraus, sämtliche: Wien I., Neutorgasse 9 (Tel.: U 23180)
Druck: Hans Likan, Wien VI., Mollardgasse 85a.